# LA PACDEFENDANTO

N-o.45. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ČEĤOSLOVAKIO Sept.1955.

## E N F A V O R A S I T U A C I O, M A L B O N A S T A T O

En nia lando troviĝas multaj esperantistoj,sed ne multaj estas aktivaj kaj spertaj por plenumi ĉiujn taskojn,kiujn la nova kaj por nia movado favora situacio antaŭ ni starigas. Tio estas grava manko, ĉar vere ni absolute ne kapablas eluzi por la profito de nia movado ĉi favoran tempon.

Ĉiuj gekamaradoj atendas ĉiu monate senpacience la alvenon de nia bulteno"La Paĉdefendanton". Ĉiuj kun ĝojo kaj ĝuo avide legas Ĝian enhavon. Kaj mi fakte de komenco jam klopodas prezenti al vi kiel eble plej multajn kaj interesajn raportojn,kiuj vin entusiasmigas kaj ĝojigas.

Kaj tamen mi ne povas vin ĉiam nur ĝojigi. Estas ankaŭ necese prezenti al vi la ĉiutagajn zorgojn, kiuj min turmentas. Ĉar sola,mi malgraŭ persisteco kaj entusiasmo ne kapablas solvi ĉiujn problemojn kies likvidigo ja estas ankaŭ en via intereso. Pro tio mi devas peti vian helpon.

Nia rondeto en Kopřivnice, kiu ĝis nun,kaj jam sufiĉe longan tempon,distribuas"La Pacdefendanton", jam antaŭ longe petis min,ke mi serĉu jam alian rondeton por tiu ĉi laboro,sed nun mi ricevis de ĝi leteron datitan de la 1.septembro en kiu k-dino.M.Hrčková,kiu ideologie tiun rondeton gvidas,jam ultimative proklamas,ke post la nova jaro la rondeto neplu intencas daŭrigi ĉi laboron.

Mi jam en Otrokovice dum nia TUTŜTATA menciis ĉi situacion,sed bedaŭrinde niaj rondetoj verŝajne forgesis diskuti pri tiu ĉi tikla problemo,ĉar ĝis hodiaŭ mi ne akiris rezulton.Antaŭe la gekamaradoj de nia distribuanta rondeto plendis,ke pro tiu laboro stagnas la tuta aktiveco de ilia rondeto, ĉar la plej aktivaj gekamaradoj estas ĉiam plene okupataj per la distribuado. Sed nun al tiu malfacilaĵo aliĝis ankoraŭ plua, nome, manko de financaj rimedoj.

Kvankam ni posedas propran multobligmaŝinon,kiu kuŝas pasiva en Kopřivnice,ĉar ne troviĝis tie liberaj kaj spertaj manipulantoj,ni devas ĉiu monate elspezi grandan sumon/č.700Kčs/ por la multobligado al neesperantisto,kiu nur faras tiun laboron por sia persona profito.La arango de nia TUTŜTATA kaŭzis al ni ankaŭ apartan elspezon,kiun la enspezoj neniel kovris. Krom tio nia anaro daŭre disvastiĝas kaj sekve ankaŭ la korespondado kun la redakcio kreskas kaj forĉerpas rimarkindan sumon. Sekve de tio kaj malgraŭ la "municio",kiun malavare sendadas kelkaj gek-doj,la kasasto estas tia,ke el mia propra mono mi krom la konstanta laboro,ankoraŭ devis investi pli ol du mil kronojn por povi eldoni ĉi bultenon kaj fine la situacio statas tiel,ke ofte mankas mono eĉ por la afranko de la gazeto. La lastan n-on.mi pretigis kaj sendis al Kopřivnice por distribuado.Ĉar antaŭ ĉio mi devis pagi por la multobligado,por kio mi parte eĉ ankoraŭ ŝuldas,neplu mi sukcesis akiri monon por poŝtmarkoj kaj la rondeto en Kopřivnice devis preni ĝin el propra kaso kaj kolekti inter siaj membroj.Nun k-dino. Hrčková skribas:"Ni ne povas labori kaj ankoraŭ aĉeti per nia mono poŝtmarkojn.Pro tio ankaŭ

la ofta malfruiĝo de nia gazeto. Nun ankoraŭ du kunlaborantoj foriros por partopreni profesian kur-son kaj kun la du aŭ tri restintaj neeblas regi ĉi laboron!"

En la unua duonjaro nia financa situacio permesas la necesajn elspezojn, ĉar amase venas el ĉiuj lokoj la abonpagoj, sed pli poste tiu alfluo jam stagnas, multaj kutimas pagi gis jarfine kaj kelkaj tute forgesas kaj devas esti ofte eĉ kelkfoje admonataj. Ankoraŭ nun pli ol 100 gek-doj ne renovigis sian jarabonon por 1955. Tio signifas mankon de 1.200 kronoj kaj pli. Se ni tiun monon havus, multe pli facila estus nia laboro. Niaj abonantoj devas jam konsciigi, ke ni nenie havas krediton. Ni devas ĉion tuj pagi; la gazetpaperon, kovertojn, la presitajn titolpagojn, la pacreklamon sur la kovertoj, poŝtmarkojn por la distribuado kaj fine ankaŭ la multobligadon. La rondeto en Plzen ĉiumonate oferas multan tempon, dum kiu ĉiuj anoj estas okupataj nur kun la kunmetado de la gazetfolioj por povi transsendi pretan bultenon al la rondeto en Kopřivnice por distribuado. Ankaŭ tie oni perdas multan tempon per skribado de adresoj, enkovertigo, afrankado kaj ŝtampado kaj ekspedo al la abonantoj. Kaj ĉiuj, tiuj laboroj estas farataj de niaj oferemaj gek-doj. tute senpage, sen ia ajn rekompenco. Ankaŭ la redakcia kaj administracia laboro, kiu min okupas kune kun la korespondado kun la legantoj kaj por akiri raportojn, preskaŭ ĉiu tage de frumatene gis vespero, estas tute senpaga. Kaj kial ni, kelkaj entusiasmuloj tiel faras ? Unusole pro tio, ke ni klare vidas la pli ol iam ajn favoran situacion, kiun necesas ĉiukaze plene eluzi.

Sed ankaŭ la plej entusiasmaj batalantoj foje povas laciĝi vidavide la oportunecon de granda nombro da ceteraj "samideanoj" - Kaj tiel jam estas nun !

La rondeto en Kopřivnice laciĝis. Ĝi ne havas tempon por arangi kursojn kaj aliajn propagandajn entreprenojn, ĝi ne havas tempon por edukado de siaj propraj anoj, kaj dume ĝi vidas la progresojn kaj kreskon de aliaj rondetoj, ĝi mem stagnas, ĉar la distribuado de nia gazeto forprenas la tutan liberan tempon de ĝiaj aktivaj membroj. Kaj prave k-dino. Hrčková vokas, ke ankaŭ alia rondeto decidu foje transpreni tiun laboron por la intereso de la tuto.

Tiu ĉi stato devigas min starigi antaŭ vi la jenajn kondiĉojn, de kies plenumo dependas la plua aperado de nia bulteno :

Antaŭ ĉio estas necese, ke anoncu sin grupo, kiu transprenus la distribuadon de "La Pacdefendanto". Tio signifas, ke tiu grupo ricevos el Plzen ĉiu monate la pretan gazeton kun la necesa kvanto da kovertoj, kiun ĝi dissendos al ĉiuj abonantoj. Kartotekon kun adresaro ĝi ricevos de Kopřivnice. Kompreneble estus dezirinda, ke la bulteno estu eldonata ankaŭ sub la firmao de tiu ĉi rondeto. La poŝtmarkojn por la afranko pagos la administracio en Plzen.

La jarabonon 12.-Kčs ni decidis kiam ni ankoraŭ multobligadis la gazeton en Plzen per propra maŝino, senpage. Nun ne eblas multobligi en Plzen, ĉar mankas klubejo k. firmao, sub kies nomo ni povus la maŝinon instali. Eble pli poste la situacio ŝanĝiĝos. Sed nun tiu ĉi jarabono ne sufiĉas por kovri la elspezojn kiam ni devas por la multobligado pagi.

Estas nur unu elirvojo por certigi la pluan aperadon de nia gazeto: la rondetoj aŭ individuloj helpu per financa subteno egaligi la nunan deficiton, aŭ ni devus kontentiĝi per malpli ampleksa, eble 4-6paĝa cirkulero, kiel estas la regionaj. De la nova jaro ni devos la prezon de la jarabono egaligi kun la elspezoj, por eviti novan deficiton. Kompreneble tiu ĉi stato ne permesas, ke niaj abonantoj ŝuldu la jarabonon gis la jarfino kaj mi insistē petas tiujn, kiuj gis nun ankoraŭ ne pagis ke ili baldaŭ sendu sian kotizon por plifaciligi nian situacion.

Nun, kiam jam klare montriĝas ĉi-uj perspektivoj por generala aprobo de nia movado kaj oficiala agnosko de nia lingvo, nun, kiam ni jam eliris la plej malbonan kaj senesperan situacion post 4-jara batalo kaj preskaŭ staras antaŭ la definitiva venko kaj glora estonto, nun ne eblas cedi, sed necesas persisti.

Estus ridinde - sin montri nun malfortaj! R.BURDA

## Karl KVIST, pri siaj impresoj el Ĉeĥoslovakio

Okaze de mia vizito ĉe la "Spartakiado"mi ankaŭ kaptis la okazon por lerni koni la belan urbon Praha.Dum nur kelkaj tagoj kompreneble mi ne havis tempon por lerni koni pli ol partojn de tiu urbo,sed tamen sufiĉan,por povi konstati,ke Praha estas unu inter la plej belaj urboj en Eŭropo kun la prikantita,belega rivero Moldau,kiu trafluas la urbon kaj tiel pligrandigas la belecimpreson.La antika kastelo Hradčany estis honore al la Spatakiado fasadlumigita dum la vesperoj kaj similis al fabela kastelo ĉio,tio kontribuis por fari mian viziton neforgeseebla.

Nenian antaŭe mi vidis tiom multe da homoj sur la stratoj en iu urbo kiel ĉi tie en Praha dum la Spartakiad-semajno.Ŝajnis al mi,ke la tuta respubliko estis kolektiginta ĉi tie por partopreni la grandegan sportfeston. Mi do havis multajn okazojn por ekkoni la ĉeĥoslovakan popolon malgraŭ ke mi ne regis ĝian lingvon,mi bone interkomprenigis pere de germana kaj parte esperanta - lingvoj. Kion faris nun tiuj ĉi libertempantaj spartakiadvizitantoj dum la tempo kiam ili ne partoprenis aŭ nur rigardis la Spartakiadon ? Jes,oni vizitadis operojn,teatraĵojn,baletojn,koncertojn kaj kinejojn. Estas bone zorgita por tiu parto de la kultura vivo en Ĉeĥoslovakio, sed ĉiuvespere la biletoj al tiaj aranĝoj estis finvenditaj kaj preskaŭ ne ebla ricevi biletojn,se oni ne antaŭmendis tiujn iun tagon pli frue.Inter la filmoj,kiujn oni reklamis,mi rimarkis tute novfaritan kolorfilmon pri la fama ĉeĥa nacia heroo Jan Hus.

### Socialismo altigas la prosperon.

Oni ja ne taksu la prosperon de popolo nur laŭ ĝiaj vestoj, sed tamen troviĝas parto da vero en la aserto,ke la vestnivelo de la popolo ankaŭ donas bildon pri la cetera nivelo.En Praha kaj aliaj lokoj,kiujn mi vizitis,ĉiuj estis bone vestitaj kaj krom tio ankaŭ bele vestitaj.Mi fakte streĉiĝis por povi trovi almenaŭ iun kiu estus irinta en ĉifonoj,sed tiajn homojn ne estis ebla trovi. Oni devus vojaĝi al la urboj de la "Libera Okcidento"por trovi la mizeron,en Parizo,Vieno,en la Okc.germanaj grandurboj oni ofte renkontas mizerulojn,sed ne en Praha kaj cetera Ĉeĥoslovakio.

Ankaŭ ne la almozpetulado,prostitucio kaj la gejunulaj krimligoj ekzistas en la nuna Ĉeĥoslovakio,ĉio,tio malaperis kune kun la kapitalismo. Kaj kial ? Simple pro tio,ke al ĉiu laborvola civitano estas laboro garantita.Li ĝuas senkostan malsanulflegadon,senkostan medicinon kaj parte eĉ plenan salajron dum la malsantempo,eĉ la dentflegado estas senkosta kaj maljunuloj ricevas pension/renton/. Kaj la gejunularo ? ĝi ne havas intereson por la gangsterromantiko,la ĉeĥoslovaka gejunularo studas,sportas kaj partoprenas en la cetera, riĉa kulturvivo,kiun la respubliko donas al ĝi.Sur la stratoj en Praha kaj alieloke oni povas sekure kaj pace promeni kiu ajn tempe dum la diurno sen timo pri atakoj de "ligistoj",prostitulinoj ktp.

### Sekurita estas la estonto de la gejunularo!

Eble la plejfortan impreson,kiun oni ricevas dum la vojaĝo en ĈSR donas certe la gejunularo. Kia brilega gejunularo,plena de ŝprucanta gajeco,vivo kaj kredo al la estonto kaj en la mezo de kreanta laboro por la socialista ŝtato.Ĉie oni tion rimarkas, ĉie oni renkontas legantajn gejunulojn,studantajn gejunulojn kaj ĉiuj el ili,kun kiuj oni parolas, brulas pro scienco kaj intereso por studado,por kulturaj kaj por pacaj demandoj. Sed la ŝtato prizorgas tion tre bone por ili. Ĉiuj gejunuloj,kiuj havas emon kaj kapablon por studado povas studi en ĉiuj fakoj,tio kostas al ili nenion kaj ili eĉ ricevas salajron dum la studtempo. Laŭ sciigoj,kiujn mi ricevis de stu-

dentoj en Praha kaj Otrokovice ve- nas 50% da studentoj por altlernejoj kaj universitatoj el la laborista klaso. Tiu fakto diras pli ol vortoj, se oni komparas, ke ĉe ni en Svedio tiu cifero ne superas pli ol 3-4 %.

La fabrikoj de la Ŝuorego Bata nun estas propraĵo de la popolo:

La sekvanta celo de mia vojaĝo estis Otrokovice, kaj alveninte tien mi troviĝis en mezo de granda industria centro, kie pli frue reĝis la ŝuorego Bata kaj tiam enpoŝigis la profitojn el la laboro de la popolo. Hodiaŭ tiuj ĉi grandegaj industrioj estas posedaĵo de la popolo kaj portas la nomon "SVIT".

La centro por tiu ĉi ŝuindustrio estas ne Otrokovice, sed la proksima multe pli granda urbo Gottwaldov, kvankam ankaŭ en Otrokovice ekzistas granda parto de la ŝuindustrio. Okaze de Esperantista Packonferenco mi restis en Otrokovice 5 tagojn kaj ankoraŭ kun aliaj eksterlandanoj mi estis akceptita de la uzina klubo kiel ties oficialaj gastoj. Ni rajtis loĝi kaj manĝi senpage en la tre komforta klubdomo, kiu, parenteze dirite, havis en si ĉion dezirindan, hotelon, manĝsalonon, kinejon, teatrejon, ekspozicio-halon, studĉambrojn, lokalojn por ŝatokupoj, ŝakĉambrojn, frizejon ktp. Por la ĉeĥosl. laboristoj kaj ties organizoj ekzistas neniaj lokaj problemoj, tiorilate estas benege zorgita.

En Otrokovice mi ankaŭ havis okazon vidi, kiel la ŝulaboristoj loĝas. Multaj estas esperantistoj kaj ili invitis min al siaj hejmoj. Ankaŭ tie mi povis konstati generale bonan nivelon, modernajn, grandspacajn loĝejojn kun ĉiu komforto kaj por malaltaj luprezoj. Al ĉiu domo apartenis ankaŭ lavejo por maŝinlavado kun ĉiuj modernaĵoj kaj tie oni povis, por tre modesta kosto lavi por la familioj la tolaĵon, se-kigi, glatigi ĝin ktp.

Ligita al la industrio estas ankaŭ bone arangita infangardeno. Tie la patrinoj povas lasi siajn infanojn dum la tago, se ili laboras aŭ malsanas. Tielmaniere eblas ankaŭ al virinoj partopreni en la produktado, ĉar ekzistas ebleco liberigi sin de multaj hejmlaboroj. La partopreno de virinoj en la industria produktado estas ankaŭ granda, sed la virinoj estas ankaŭ egalrajtaj, kiam temas pri salajroj por egala laboro. En la fabrikoj estas ankaŭ grandaj manĝejoj kie la laboruloj povas tre malmultekoste antaŭtag- kaj tagmanĝi.

Per Esperanto por la paco:

Tio estis la devizo por la landampleksa Esperanto-konferenco, kiu okazis en Otrokovice kaj kiun partoprenis pli ol 300 esperantistoj krom gastoj el Francio, Usono, Danlando, Svedio kaj Aŭstrio. La konferenco daŭris 5 tagojn kaj ĝi celis kolekti la esperantistojn sur bazo de Mondpaca movado por labori por la paco pere de la internacia lingvo. Al tiu konferenco aliĝis ankaŭ reprezentanto de la Lingvoscienca Instituto en Moskvo, sed pro intervenaĵoj li devis sciigi telegrame, ke li ne en sufiĉa tempo povas atingi jam la konferencon. En la sama telegramo li sciigas, ke ankaŭ en Sovjetio fondiĝos simila porpaca Esperanto-movado.

Tutcerte tiu ĉi packonferenco havos grandan signifon ankaŭ en la internacia paclaboro. Krom kutimaj konferencaj intertraktoj okazis ankaŭ ĉiutage prelegoj pri pacdemandoj, ekzemple: "La Hiroŝima-bombo" akompanata de aŭtentika japana filmo, "Marksismo kaj la lingvoscienco" bazita sur la verko de Stalin kun sama titolo, "Ŝtatigo de la industrio en ĈSR", ktp.

La konferencon ĉeestis ankaŭ katolika pastro, kanoniko Macek, konata batalanto por la paco, li eĉ prelegis katolikan meson esperantlingve. Venu poste kaj parolu pri religiaj persekutoj en Ĉeĥoslovakio ! Fine mi nur volas akcenti, ke ankaŭ en tiu ĉi konferenco partoprenis la gejunularo tre aktive.

Rim. de la red.:
Tiun ĉi raporton ni prenis el la sveda gazeto "NYA VARMLAND", Krom ĝi, k-do. Karl KVIST raportis ankaŭ en aliaj svedaj gazetoj pri siaj impresoj, kiujn li akiris dum la vizito de nia TUT ŜTATA .

Certe estus dezirinda en la intereso de nia movado prezenti ties tradukon ankaŭ al naciling-vaj ĉeĥoslovakaj ĵurnaloj.

## F I N E   K L A R I Ĝ I S

En aŭgusto fondiĝis Esperanto-
Pacrondo ĉe la 5a distrikta Kul-
turhejmo en Budapesto.La unuan
kunvenon ĉeestis inter aliaj ge-
kamaradoj,J.Baghy,P.Balkányi,A.
Nemeth,Lájos Márton,M,Kenesei k.
Pálma Nagy.Ĉiuj akceptis funkci-
on kaj de nun okazos regul.kun-
venoj ĉiu ĵaŭde de la 17-21a ho-
ro en la Kulturhejmo.La Rondo ri
-cevis leteron de partia ĵurnalo
"ESTI BUDAPEST",kiun eldonas la
urbkonsilantaro,en kiu oni skri-
bas:"Pri la estonto de la hunga-
ra Esperanto-movado devas zorgi
la esp-istoj mem.Ili kolektu la
malnovajn kaj eduku novajn espe-
rantistojn,se deziras ke Esperanto
vivu en Hungario - kontraŭ kio
ne ekzistas ia principa malhelpo
- ankaŭ la radiostacio nehezitos
doni helpon."

Oni promesis publikigi pli gra
-vajn raportojn el nia movado.La
subskribinto,k-dino.Erzsébet Kiss
iama esp-istino,skribis la last-
an frazon en Esperanto:"Ni dezir
-as,ke la malnovaj samideanoj re
-organizu la Esp-movadon!"

La hung.gek-doj.do ekagu en ĉi
-uj lokoj! Kaj la eksterlandaj
gek-doj.morale subtenu ilin. La
jam oficiala Esp-pacrondo havas
nun eblecon ankaŭ por diversaj
aranĝoj en la Kulturhejmo.Ĝi pre
-paras propagandan ekspozicion
kiel antaŭludon por kursoj. Por
tiu celo sendu konvenan material
-on/gaz.,afiŝojn,fotojn ktp/an-
kaŭ materialon por lumbildparol-
adoj kun tekstoj,al jena adreso:
"Paco-Esperanto-Rondo/Béke Ezs-
peranto Kör/V.ker.Kulturotthon,
V.Engels-ter,BUDAPEST,Hungario.
Skribu ankaŭ al RADIO-BUDAPEST
kaj petu Esp-programon kaj elsen
-don de informoj! K-dino.M.Kene-
sei jam ricevis de la 4a distr.
Packomitato premion por bona la-
boro per Esperanto. Pál Balkányi

Fine klariĝis,ke por labori per
Esp-o por la mondpaco,nenecesas
en Popoldemokratioj atendi ofi-
cialan permeson. La red.

## BULGARAJ PACDEFENDANTOJ TUT-ŜTATE KUNVENIS

La 11.de sept.okazis tutŝtata
konferenco de Esp-pacdefendantoj
en Plovdiv/Bulgario/.Ĉeestis pli
ol 200 gek-doj el multaj lokoj.
La Bulg.Esp-Asocio kaj Kooperati
-vo fariĝis sekcio de Mondpaca Es-
perantista Movado/MEM/En 7membran
estraron estis elektita ankaŭ nia
ĝisnuna prezidanto k-do.B.A. Velev,
al kiu ni dankas la renaskiĝon de
nia movado en Bulgario. Cifudov

## RADIO-BUDAPEST ENKETAS PRI ESP-O.

La budapesta radiostacio pro-
klamis konkurson por la plej bona
respondo de jena demando:"Kio est-
as Esperanto kaj kiu estis ĝia aŭ
-toro?"La 31/7 ĝi diskonigis la
rezulton.Inter aliaj donis plej
objektivan klarigon profesoro de
budapesta Lingvo Instituto,kiu di
-ris,ke d-ro.Zamenhof mem komenc-
is krei la Esp-literaturon,tradu-
kinte klasikaĵojn kaj ankaŭ verk-
ojn de d-ro Kalocsay.La radiosta-
cio deklaris,ke inter ĉiuj ĝisnu-
naj demandoj,tiu ĉi lasta renkon-
tiĝis kun plejgranda intereso de
la aŭskultantaro.Inter la respon-
dantoj ricevis la unuan libropre-
mion nia k-do.Pál Balkányi.Estas
eble la unua kazo,ke la radiosta
-cio donis premion por pri-esperan
-ta raporto.Ne forgesu per leter-
oj instigi ĝin al pluaj agoj kaj
precipe al Esp-lingvaj relacioj!

## ESPERANTO EN BRAZILA ROTARY-KLUBO

Okaze de 50jara ekzisto de la
"Rotary-Klubo"en Curitiba ties o-
ficiala organo publikis sur sia
titola paĝo Esp-lingve kaj portu-
gale prelegon pri Esp-o,kiun aran
-ĝis s-ano.Carlos GEISER en kunve
-no de Rotarianoj de ĉefurbo Curi
-tiba en Brazilio.

## ĈU VI JAM SCIAS ?

ke la urbestro de Bologna,kiu in
-vitis la 40.Universalan Esperan-
to Kongreson al Italio,kaj salut-
is la kongresanojn en perfekta Es
-peranto, kiu solene inaŭguris laŭ
d-ro.Zamenhof novan straton en Bo-
logna kaj donis artvesperon kun
teatraĵo"La Revizoro",luksajn re-
freŝaĵojn kaj senpagan uzadon de
tramoj kaj omnibusoj al ĉiuj kon-
gresanoj,kiu finis sian paroladon
per la vortoj "Vivu la paco kaj
amikeco inter la popoloj de ĉiuj
landoj kaj kontinentoj!"-ĉu vi
scias,ke tiu ĉi urbestro de Bolog
-na,k-do.Gioseppe DOZZA estas ko-
munisto ?La neutralaj esp-istoj
preskaŭ ŝtoniĝis,ekscíinte,ke komu
nista urbestro subtenas Esp-on. -
A.Opisso-GENOVA

UZU NIAN "MIGRANTAN BIBLIOTEKON !
Adr.:Al.Zmeŝkal,Celetná 2,PRAHA I.

KORESPONDI DEZIRAS :

Trilinia anonco koštas 3.-Kčs aŭ 3 int.resp.kuponojn.Ĉiu anoncanto es -tas petata almenaŭ unufoje respon -di per il.p.karto.

Bonvolu korekti:K-do.Saričev kaj Nikiforova el Sovjetio ne deziras korespondi.Iliaj adresoj estis publikitaj surbaze de erara informo.
K-do.Quan/adreso en L.P.43/kaj kdo Vu-nam-Dien/gusta adr.:No.9,Thuy Khuê/el Viêt-nam,neplu korespondas pro subita malsanigo.
K-do.N.V.KINH,No.2,Ly-thüêng,Kiêt, HÁNÔI,Viet-nam,petas por fondi MEM sekcion divers.propagandmaterial.
K-do.O.Marek,instruisto,ŽAMBERK č. 797,Ĉeĥoslovakio,kun instruistoj k natursciencistoj por interŝ.skarabojn k papiliojn el ĉiuj mondpart.
K-dino.Vali MATUŠOVÁ,Smolnícka Píla,p.MNÍŠEK n/Hnilcom,Ĉeĥoslovakio /25j.librotenistino/interŝ.let.,il. p.k.kaj modajn ĵurn.kun č.landoj.
K-do.E.Rosner,Lugauerstr.87,OLSNITZ -Erz.,Sachsen,Germanio-DDR,interŝanĝas pacpropagandan materialon.
RADIO-ROMA,Casella postale 320,ROMA Italio,sendos al vi senpage Esper. progr.kaj prospekton.Petu multnomb.
BALKANTURIST/turista entrepreno/Str Dobrudja No.10,SOFIA,Bulgario,eldonis Esp-lingv.prospekton.Petu senpage ĉe supra adreso.
Ĉiun propagand.materialon mendu ĉe K-do.Jos.REISER,Krajská spr.spojů, Tylova ul.PLZEŇ,Ĉeĥoslovakio.

ESPERANTO-ĈEĤA PACLETERO

kun trafa propaganda teksto en formo de flugfolio,uzebla kiel leterpapero,verde presita,eldoniĝis pere de k-do.Jarka DITTRICH,Medlov,pošta POHOŘELICE,Ĉeĥosl.Ni rekomendas ĝin.

ESPERANTA LITERATURO

En Bulgario funkcias ŝtata entrepreno"NARODNA KULTURA",kiu eldonas verkojn de emin.bulg.verkistoj kaj poetoj en kelkaj lingvoj.Se ĝi ricevus multajn petojn pri eldono de Esp-lingvaj verkoj,certe ĝi eldonos tiajn. Skribu al:"NARODNA KULTURA",Str.Graf Ignatiev No.2,SOFIA,Bulgario.

BRAZILA KORESP.CENTRO POR TUTMONDO

Poŝtkesto 1612,CURITIBA - Brazilio.
Sendu en la jaro 100 uzitajn p.m. kaj vi fariĝos membro.Por la Adresaro aldonu nomon,adr.,naskiĝdaton, profesion kaj sekson,koresp.lingvojn.

VOKAS VIN BRAZILIO !

En urbo Curitiba oni arangos en decembro grandan ekspozicion por propagandi al 1/4miliona loĝantaro nian lingvon.Necesas subteni tiujn klopodojn per amasa alsendo de Esp-gaz.,revuoj,bildkartoj, fotoj,p.m.,afiŝoj ktp.Ĉiu sendinto ricevos raporton pri la procedo de la ekspozicio.Krom en Esp-o. oni koresp.en angla,franca,itala hispana,germana,araba,pola,ĉeĥa, hebrea kaj greka lingvoj. Adreso: Carlos GEISER,poŝtkesto 1612,CURITIBA,Brazilio.
Aliaj,eĉ naciolingvaj gazetoj estas petataj represi ĉi alvokon.

MUNICIO POR NIA BATALO

| | |
|---|---|
| K-do.Pregojano-Slov. | 100.-Kčs |
| K-do.prof.Brožík-Sušice... | 2.-" |
| K-do.pastro Macek-Mikulov. | 10.-" |
| K-do.B.Háva-Liberec....... | 2.-" |
| K-do.J.Pastušek-Karviná... | 10.-" |
| K-do.J.Havlíc-Plzeň....... | 5.-" |
| K-do.J.Hořejší-Plzeň...... | 3.-" |
| K-do.J.Plachý-Plzeň....... | 2.-" |
| Somera Esp-Kolegio,Doksy.. | 60.-" |
| K-do.J.Ballay-Brno........ | 2.-" |
| K-do.J.Řebíček-Olomouc.... | 10.-" |
| K-do.V.Oldřich-Karl.Vary.. | 7.-" |
| K-do.V.Skála-Plzeň........ | 3.-" |
| K-do.K.Valenta-Plzeň,..... | 10.-" |
| K-do.J.Kazda-Karl.Vary.... | 12.-" |
| K-do.R.Janečka-Lípová..... | 38.-" |
| Esp-rondeto,Kopřivnice.... | 90.-" |

Ĉiuj akceptu nian sinceran dankon kaj estu ekzemploj por aliaj

EFIKA FLUGFOLIO

Dům Osvěty Petra Bezruče,Nádražní okruh č.27,OPAVA,ĈSR,eldonis presitan prospekton en ĉeĥa lingvo pri la nuna valoro de Esperanto kun aliĝilo por kurso,uzebla ĉiuokaze.Mendu ĉe supra adreso.Ni rekomendas ĝin al ĉiuj lokoj.

A T E N T I G O

Pro manko de mono,tiu ĉi n-o. estas nur 6paga.Pro tio ni devis prokrasti la publikigon de gravaj raportoj el Viet-namo,Sovjetio,Japanio k.a.informojn eĉ anoncojn.Ni tamen esperas,ke por la oktobra n-o.nia financa situacio jam pliboniĝos.El sama kaŭzo ankaŭ malfruiĝis tiu ĉi n-o. La redakcio petas vian toleremon kaj pardonon,kion ĝi pli poste rekompencos.

Eldonis: Závodní Klub ROH-odbor Esperanto,TATRA,n.p. KOPŘIVNICE.ĈSR.
Redaktis: K-do.Rudolf BURDA,Palackého nám.č.6, PLZEŇ, ĈEĤOSLOVAKIO.